## Notoj

(1): vd. http://cisad.adc.edication.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf
(2): vd. http://www.lingvo.org/grin/raporto_grin_XX.pdf. Substituigu respektive cz, pt, nl aŭ Eo al XX, laŭ la dezirata lingvo
(3): www.lingvo.org
(4): edukado.net "Tago de Lingvoj"
(5): vd. www.ecml.at/edl/default.asp?t=materials
(6): legu http://www.liberafolio.org/2006/ghenuloj
(7): http://epp.eurostat.ec.europa.eu

## Referencoj

*AMMON U. & N. DITTMAR* (2006): Sociolinguistics/Sociolinguistik, Vol 3

*GRIN François* (2005). Haut Conseil de l'Evoluation de l'Ecole, Rapport n-ro 9

*OSTWALD Wilhelm* (1910). *Die Forderung des Tages, Leipzig. Akademische Verlagsgesellschaft.* Citita de *Henry Jacob*, 1943. *Otto Jespersen. His work for an International Auxiliary Language. Essex; International Language* (Ido) *Society of Great Britain*, 30

*PHILLIPSON* (2003). "*English-only Europe?*", 2003, tradukita kiel "Ĉu nur-angla Eŭropo?", *Rotterdam* UEA, 2004, p. 82

*PLOQUIN Françoise* (2005). Le Monde Diplomatique, jan. 2005, p.22-23

*VAN PARIJS Philippe.* "L'anglais lingua franca de l'Union européenne: impératif de solidarité, injustice distributive, facteur de déclin?" en: Économie publique 15(5), 13-32

*VERGARA J.A.* (2006a). La ŝanĝiĝanta interrilato scienco-socio: koncernoj por ISAE en la 21-a jarcento, Scienca Revuo, 57, 127-140

*VERGARA J.A.* (2006b). Scienco, demokratio kaj Esperanto: Ideoj antaŭ la centjariĝo de ISAE. Esperanto (UEA), 99, 243-251

## Adreso de la aŭtoro

*Johan H. DERKS*
*Rietgors 40*
*NL – 8271 GH IJsselmuiden* / NEDERLANDO
<derks.esp@tiscali.nl>

## Priaŭtora informo

La aŭtoro studis teorian fizikon kaj sociologion en *Utrecht* / Nederlando, instruis mezlernejan matematikon kaj statistikon en Ugando, Kamerunio kaj Nederlando. Li estis sekretario kaj kasisto de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj kuntradukinto de la raporto *Grin* al la nederlanda lingvo kaj al Esperanto.





# Pri nacieco kaj sennacieco

*Mira MAKIVIĆ*

Pripensante la nomon de "Sennacieca Asocio Tutmonda", mi neeviteble renkontas la demandon: Kio signifas "Sennacieca"? Mi konas diversajn teoriojn pri la ekesto de nacioj kaj sennacieco. Jen, mi listigas kelkajn:

1. Spiritualistoj opinias, ke la ekesto de nacio estas la ŝtato kiel unuiganta komunumo, en kiu oni formas nacion (tiel opinias *Hegel* kaj *Glumpović*);
2. Pozitivistoj parolas pri la nacio kiel pri statika areo de sama lingvo, sama deveno kaj samaj moroj;
3. Vulgaraj materialistoj diras, ke la nacion faras la idoj de antaŭuloj, kiuj de unu generacio al la alia transdonas siajn proprecojn;
4. Subjektive-psiĥolgia teorio asertas, ke la nacio kaj la nacieco ekzistas en la sento de individuoj, ke ili estas anoj de iu nacio;
5. Aŭstriaj demokratoj perceptas la nacion kiel kategorion de "kultura afero";
6. Marksistoj traktas la nacion kiel formon de homa komunumo, kiu estas ligita al iu historia periodo, kaj tial ĝi estas influita de la evoluo de produktantaj fortoj kaj de la socia divido de la laboro. Marksistoj neas la ekziston de pra-nacio ĉar ili opinias, ke nacieco estas ligita al la ekesto de kapitalisma socia ordo (tiel indikas *Friedrich Engels* en "Deveno de la Familio").

Eĉ antaŭ la kapitalismo, danke al politikaj ŝtataj institucioj, ekestis novaj popoloj, intermiksiĝante, sin interligante kaj dividiĝante, tiel ke estiĝis popoloj kiel "antaŭnacioj".

Kiam nacio sin esprimas kiel antaŭnacio? La respondo estas: tiam, kiam en la scenejo de la historio ekaperas kapitalismo, kaj kiam interligiĝas la amasego de produktantoj, kiuj postulas intertrafikon kaj ĉiutagan komunikadon pere de **lingvo** kiel la unua grava elemento de la nacio. Samparenca lingvo estas grava elemento de la nacio, kaj la vivo en stabilaj politikaj organizformoj favoras plifortiĝon de nacia unueco.

Sed ŝanĝo de politikaj limoj estas kontraŭproduktiva, t.e. tiam okazas malunueco pro nestabileco de la nacio. La evoluo de kapitalismo ŝanĝas ankaŭ la rilatojn inter homoj kaj tiel la ekonomiaj rilatoj (merkato) fariĝas elemento de la nacio. Tial ankaŭ ekestas la aspiro, unuigi nacie homogenajn teritoriojn. Pro tio la ekonomia interligiteco iĝas nacie grava elemento de sinesprimo de iu popolo kiel antaŭnacio.

La tria grava elemento estas la politika organizformo, en kiu oni povus formi lingvan kaj ekonomian interligojn. Estas klare, ke la historia evoluo en la sama teritorio kaj en la sama soci-historia situacio, devas havi sian reflekton en la psiĥa konstituo de la nacio, kaj tial oni devas ankaŭ diri, ke klaseco influas la psiĥan konstituon de la nacio, ĉar la klaso de laborantoj estas tiu, kiu en siajn manojn prenas la estontecon de la nacio, kio esprimiĝas per diversaj formoj, t.e. en tiuj politikaj organizoformoj, kie tiu klaso regas, sed ankaŭ per aliaj formoj de kunlaboro kaj asocieco, plejofte en la formo de humaneca solidareco.

Identiĝo, kiel piĥologia sindefenda meĥanismo, estas senkonscia proceso kaj neevitebla helprimedo, pere de kiu la homoj identiĝas sin kun aliulo. Tiel same, ni esperantistoj-sennaciuloj senkonscie identiĝas kun la nacieco kaj ŝtatoj, el kiuj ni venas. Kaj jen, ni estas ankaŭ konsciaj homoj, esperantistoj, do – **kial ni senkonscie identigas nin kun nacieco**? Ĉi tie mi parolas pri la enhavo de niaj kreditkartoj, ĉar tie ni metis la nomon de nia ŝtato, akceptante tiel la spiritualistan teorion pri la nacio.

Do, **kial ni metas tie la nomon de nia ŝtato, se ni povas meti nur la nomon de nia urbo**? Aŭ, ni povas en iu alia maniero marki



nian kongresan numeron, la nomon kaj familian nomon, la lokon el kiu ni venas. Ni estas **sennacia** asocio tutmonda, kaj ni metis nian nacian markon – la nomon de la ŝtato el kiu ni venas, kiu estas nacia kaj ne mondeca resp. sennacieca. Rigardante el la vidpunkto de la marksisma teorio pri la nacio, ni estas nacio de esperantistoj.

Ni esperantistoj havas ne unu landon, **nia estas la tuta mondo,** kaj tiasence oni devus ŝanĝi la markojn, kiuj rilatas al individua identigo – kiel la kreditkartojn de kongresaj partoprenantoj.

Jen mia propono, kaj mi tre interesiĝas pri la opinioj de aliaj.

**Artikolo 1** de la Statuto de Sennacieca Asocio Tutmonda diras pri niaj celoj:

a) utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda,

b) kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de homeca solidaro,

c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj,

ĉ) servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT,

d) peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

Plej grave estas substreki la diferencon inter kaj trakti pri sennacieco kaj sennaciista, sennaciula kaj sennacieca. Aparte sciendas ke SAT estas tiel strukturita, ke la landoj havas nenian signifon, nur la homoj (kvankam ni ne povas eviti la fakton, ke la landoj/ŝtatoj ekzistas).

Kadre de SAT ekzistas sennaciista frakcio (kiu jam ekde la fondiĝo estis aparta frakcio kun oficiala organo "Herezulo"). Sennaciistoj rifuzas etnan apartenecon kaj konsideras sin mondcivitanoj. Eble mi havos la okazon, dum la centjariĝfesta konferenco de ISAE en Tavoleto pli detale klarigi la nociojn kaj difinojn de "nacieco" kaj "sennacieco" – kaj rompi iluziojn. Ni ne aliĝu al iu

grupo, ni ne akceptu iajn diskriminaciojn devenantajn el moroj kaj dividecoj – neniajn kiaj laŭdas devenon, haŭtkoloron aŭ socian pozicion.

Novaj integraj procesoj, kiuj ekestis pro ŝanĝoj en la produkt-adaj rilatoj de la moderna mondo, kaj pro ŝanĝoj en progresado, kaŭzas, ke la spiritaj produktoj, kiel *Marx* kaj *Engels* indikas en "Manifesto", fariĝas ĝenerala havaĵo, kaj ke naciaj limitecoj fariĝas pli kaj pli neeblaj.

La homaro ekzistas kiel speco, ne kiel aro de individuoj kaj nacioj. Per aliro de ĉiu individuo al diversaj formoj de la kompleksaj mondaj rilatoj de la nuntempa integrita Eŭropo oni superas ĉiujn "naciajn" limitecojn kaj tiel la individuo fariĝas parto de universala kulturo.

Ĉar lingvo havas ŝlosilan rolon en naciaj kulturoj, indas liberigi ĝin de naciaj markoj kaj tiel fari ĝin bazo de universala kulturo. Kaj tio estas Esperanto, kaj tion povas fari esperantistoj, kaj speciale la anoj de Sennacieca Asocio Tutmonda.

**Adreso de la aŭtorino**
*S-ino Mira* MAKIVIĆ
*c/o University of Banja Luka*
*Bulevar vojvode Petra Bojovića 1A*
*78000 Banja Luka, Republika Srpska, BiH*
BOSNIO-HERCEGOVINO
<uni-bl@blic.net>


**Priaŭtora informo**

La aŭtorino estas juristino ĉe la Universitato de Banja Luka, Bosnio-Hercegovino. Ŝi estas firme ligita kun la urbo Banja Luka. Tie ŝi naskiĝis, tie ŝi finis la lernejan kaj universitatan edukadojn, tie ŝi loĝas, laboras kaj kreadas. Ŝi okupiĝas pri publicistiko, publikigis kelkdekojn da fakaj artikoloj en diversaj magazinoj kaj recenzas librojn el diversaj literaturaj ĝenroj, prozo kaj poezio. (Privataj retadresoj: <mira_makivic@yahoo.com>, http//:www.makivić.knjiga.rs.ba)

*Redakta rimarko*

*La teksto povas iom perpleksi neSAT-anojn. Kiel redaktoro de Scienca Revuo mi deziras substreki, ke ISAE volonte rilatas ankaŭ kun SAT kaj jen aŭskulti ĝian voĉon.*





# La *Varus*-batalo – decida por dumil jaroj de Europa historio

*Hans* WELLING

## Enkonduko

Tiu batalo decidis, ke la Romia Imperio ĉesigis la longjarajn klopodojn pligrandigi la imperion trans la rivero Rejno orienten. Kaj per tio ĝi plue decidis pri la lingva limo inter latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj.

## 1. La historio

58–51 a.K. "*Bellum gallicum*" de Cezaro.

12–9 a.K. *Drusus* invadas Ĝermanion trans la rivero Rejno (*Rhein*) orienten ĝis la rivero *Elbe*.

9 a.K. Li mortas tie.

6 a.K.– 6 p.K. *Tiberius* batalas en Ĝermanio.

Kiel rezulto ĉeno da kasteloj estas konstruita, oriente de la rivero Rejno, laŭlonge de la rivero *Lippe*, kaj somera kampejo proksime de Hamburgo en la norda Ĝermanio, alia sude de Hanovro. Kun la kasteloj okcidente de Rejno estis (laŭ *Florus*) pli ol 50 kasteloj (vd. Bildon 1).

7 p.K. *Varus,* antaŭe guberniestro en Sirio, fariĝas guberniestro en Ĝermanio.

9 p.K. Batalo en "Teŭtoburga Arbaro" (lat. "*saltus teutoburgiensis*").

Tri romiaj legioj sub gvido de *Varus* (entute pli ol 10 000 legianoj) estas atakitaj de ĝermanaj triboj sub la gvido de *Arminius*. Dum tritaga batalo ili estas ĉiuj mortigitaj. La orient-rejnaj romiaj kasteloj estas poste venkitaj kaj/aŭ forlasitaj.

15 p.K. *Germanicus* faras venĝo-atakon, vizitas la lokon de la *Varus*-batalo, entombigas la trovitajn ostojn de la legianoj.